# Kiel veni al Hotelo "Palas"?

**Rimarko:** Grave estas scii, ke en Beogrado publika transporto per busoj (escepte de minibusoj), tramoj kaj trolbusoj estas senpaga.

## De Flughaveno "Nikola Tesla"

- Plej bone prenu **buson n-ro 72** kaj elbusiĝu ĉe **haltejo "Brankov most"**.

  Post proksimume duonhoro, vi venos al la celita haltejo.

- Alia ebleco estas preni **taksion**. Ni rekomendas nepre fari tion jene:

  Flughaveno "Nikola Tesla" ofertas al la vojaĝantoj uzi konfirmilon, kiu ebligas fiksitan prezon. Antaŭ ol veni al taksihaltejo, bonvolu preni la konfirmilon, kiu estas havigebla en unu el kvar e-kioskoj.

  Tri e-kioskoj troviĝas ĉe la loko kie oni prenas la valizojn kaj la kvara en la halo kie oni atendas la vojaĝantojn. Por ricevi la konfirmilon, vi devas elekti la urboparton kien vi veturas. Elektu urboparton n-ro 2 en kiu troviĝas Hotelo "Palas".

  En la konfirmilo estas fiksa monsumo, kiun vi donos al taksiŝoforo. Ĝi estas 3.500 dinaroj (ĉ. 30 eŭroj).

  Prenu la unuan taksion en la vico de la taksihaltejo, kiu troviĝas proksime de la elirejo.

  Ne prenu taksiojn, kiuj troviĝas aliloke, ĉar la veturo povus esti plimultekosta.

## Se vi venas per trajno aŭ buso

Se vi venas per trajno, eliru **ĉe haltejo "Novi Beograd"** (antaŭlasta haltejo) kaj de tie prenu **buson 95** en la direkto al la centro de la urbo kaj elbusiĝu ĉe **haltejo "Brankov most"**.

Por elekti ĝustan direkton, atentu ke sur la buso estas skribite: "Novi Beograd - Borča".

Se vi hazarde iros ĝis la lasta haltejo ("Beograd centar”), kiu estas pli komplika, prenu buson 36.

Se vi venas al Beogrado per buso, vi prenu buson 95 kaj elbusiĝu ĉe haltejo "Brankov most". Tie vi transiru la straton kaj la Hotelon vi facile trovos.

*Bonvenon!*